

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 15 fkoj
Bonfara : 20 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Č.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

SEPTEMBRO - OKTOBRO

1973 5

KULTURAJ KAJEROJ

1973 — SEPTEMBRO-OKTOBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Bildoj el Skotlando

Lingva problemo en Belgio. Alia Sono M. Van Aelst

La Universala diluvo E. Motillon

Hungaraj fantastikaj filmoj P. Balkanyi

Ĝis revido, mia karulo

Pri fama verkisto de Jugoslavio H. Turin

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

El Grésillon

Sub suno brilanta finiĝis la 21-a « sezono » grezijona. Finance malpli bona ol la lastjara ĉar Beogrado estas pli proksima ol Portland por la eŭropanoj, ĝi tamen kontentige disvolviĝis. Kursoj kaj prelegoj interesis la pli multon el la ĉeestantoj kaj ankaŭ ĉijare alvenis dankaj kaj kuraĝigaj vortoj, kaj leteroj. Ĉiuj konstatis novajn paŝojn al plibonigo de la instalaĵoj. Ĉiuj vidis la « skeleton » de la prelegsalono. Sed tiuj « ĉiuj » ne estis sufiĉe multaj. Ni konfesas, ke ni estas ambiciaj. Ne por ni mem sed por vi. La sindonema taĉmento grezijona deziras, ke kelkaj mankoj estu plenigitaj. Ekzemple, estas pli agrable ĉeesti kurson aŭ aŭskulti prelegon en alloga ĉambro. Ni iom disreviĝas, kiam ni konstatas, ke parto de la planitaj laboroj ne estas farebla. Sukcesaj estas la programoj kaj gratuloj ne mankas. Sed ni opinias, ke ili estus ankoraŭ pli sukcesaj en pli taŭga kadro.

Do, venu, venu multnombre. Antaŭ aŭ post la grandaj kongresoj. Eĉ, .. karaj organizantoj de kongresoj, bonvole ŝtopu viajn orelojn .. dum la kongresoj ĉar ankaŭ en Grésillon la prelegoj estas interesaj kaj la amikoj afablaj. Semajno sen multe da partoprenantoj signifas realigojn prokrastitajn. Aĉetu niajn librojn, niajn memoraĵojn. La profiton de viaj elspezoj vi ĝuos en Grésillon.

Por plezurigi vin aŭ la aliajn

okaze de la finjaraj festoj

CENTJARDAŬRA
ESPERANTA KALENDARO

Eleganta sur via skribotablo
Praktika en la uzado
ebligas trovi iujn ajn datojn de la jaro 1900 ĝis la jaro 2000

dimensioj : 10,5 × 16 cm.

Prezo : 50,00 fr. fr. + 10 % por afranko



Esperanto tra la Mondo

LA UNIVERSALA KONGRESO EN BEOGRADO

1 638 aliĝintoj, el 42 landoj, partoprenis le 58-an universalan kongreson de Esperanto en Beogrado, de la 28-a de Julio, ĝis la 4-a de Aŭgusto. Dum la inaŭgura kunveno, S-ro John Wells faris la festparoladon antaŭ, inter aliaj, 21 ŝtataj reprezentantoj ; 16 el tiuj lastaj salutis la kongreson.

Krom la kutimaj eroj de la kongresoj, ni notu la interesan duan kunvenon dediĉitan al la lingvaj problemoj interne de pluraj landoj, la decidoj de la komitato de U.E.A. pri la estonta laborplano de la asocio, kaj pri la necesa plialtigo de la kotizoj.

La kongreso akceptis rezolucion kiu, pro la konferenco pri Eŭropa Sekureco, petas la registarojn « dediĉi seriozan atenton al la lingva aspekto de la kulturaj interrilatoj kaj antaŭenigi disvastigon de Esperanto kaj ĝian aplikon en internacia praktiko ».

S.A.T. - KONGRESO EN NORDA AMERIKO

La unua ekstereŭropa S.A.T.-kongreso okazis en Toronto de la 30-a de Julio ĝis la 5-a de Aŭgusto kun pli ol 200 partoprenantoj. La kongresanoj aŭskultis 4 prelegojn : de A. Vajan pri psikanaliza temo, de M. Starr pri la multnaciaj korporacioj, de K. Brent pri lingvo kaj politiko en Kebekio, de H. Koppel pri Camberra, la nova ĉefurbo de Aŭstralio.

La gvidrezolucio akceptita de la kongreso, interalie « subtenas la alvokon de P.K. aperinta en julia « Sennaciulo » pri la nepra neceso, ke S.A.T. estu kiel eble plej ofte reprezentata ĉe la kongresoj, kunvenoj aŭ manifestacioj de laboristaj partioj sindikatoj kaj kulturaj organizoj » kaj ankaŭ « kondamnas ĉiujn atombombajn proveksplodojn kaj energie protestas kontraŭ tiu poluado ».

En 1974, la kongreso de S.A.T. okazos en Bergamo (Italio), de la 3-a ĝis la 9-a de Aŭgusto.

LA JUNULARA KONGRESO EN SARAJEVO

Tiu kongreso arigis 282 gejunulojn el 29 landoj, antaŭ la universala, en Sarajevo. Dum sep tagoj, la gejunuloj vigle diskutis pri diversaj temoj, sub la ĝenerala titolo : « Junularo kaj homa medio ». Teatraĵoj, folklora programo, studvizitoj, ekskursoj, distraj vesperoj, agrable kompletis la aranĝojn de la semajno.

LA KONGRESOJ DE 1974 PREPARIĜAS

Jam la kongresa komitato aktivas por la universala kongreso en Hamburgo ; ĝi okazos en tute nove konstruita kongresejo ; ĉio okazos sur la « sama tegmento ». La gejunuloj kunvenos antaŭe en Münster ; antaŭkongreso : en Fredericia (Danlando) ; postkongreso : en Kronach (suda Germanujo).

La instruistoj povos kunveni en la « Internacia Domo Sonnenberg », en la Harzmontaro, okaze de la I.L.E.I.-konferenco.

EN USONO

Meze de Julio, *sukcesa semajnfino de kulturaj aranĝoj* kaj aferkunsidoj okazis en la ĉe-atlantika banurbo Fort Lauderdale. La universitato de Fort Lauderdale proponas plurajn kursojn pri Esperanto por kiuj poent-kredito estas donata al la studentoj. La konata lingvisto Mario Pei konsentis prezidi novan internacian komitaton iniciatitan de la universitato kaj kiu agados sur alta nivelo por antaŭenigi la laboron por Esperanto en universitataj medioj.

RECITALO EN BULGARIO

Recitalo de esperantaj poezio kaj kanto okazis en Târgoviŝte (Bulgario), dum tri tagoj. Partoprenis 74 individuaj amatoraj artistoj kaj 15 kantgrupoj kun pli ol 200 anoj. La jurio alguĝis 33 individuajn kaj 13 kolektivajn premiojn. Ĉeestis pli ol 600 personoj.

« LOT » KAJ ESPERANTO

Dum la universala kongreso de U.E.A., estis anoncita ke la polaj aerlinioj « LOT » havos unu el siaj kvar plej grandaj aviadiloj nomita « Zamenhof ». « LOT » jam uzas ankaŭ Esperanton por siaj propagandaj kaj informaj broŝuroj. Al Beogrado, por la kongreso, estis speciale sendita unu el la direktoroj, S-ro Pegiel kiu alportis kvarlingvan vortareton de « LOT ». La kompanio intencas organizi kursojn de Esperanto por siaj stevardinoj. Planata estas ankaŭ kreo de internacia esperantista asocio de aeronaŭtiko.

EN PORTUGALUJO

Post multjara malpermeso, la esperanto-movado renaskiĝas en Portugalujo. Jam reaperis « Portugala Esperanto-Revuo ».

NOVA ADRESO EN FRANCUJO

Unuiĝo Franca por Esperanto (U.F.E.) transloĝiĝis. Nova adreso : 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris.

LA NOVAJ LIBROJ

— « L'esperanto » : la apero de tiu libreto de profesoro Janton, en franca lingvo, en la fama enciklopedia serio « Que sais-je ? », estas aparte grava. Ĝi okazas post la eldono de « Je parle esperanto » en alia franclingva konata serio « Marabout-Flash ».

Profesoro Janton instruas oficiale Esperanton en la Universitato de Clermont-Ferrand. Ĉiu franclingva esperantisto devus, laŭ ni, posedi kaj legi tiun libreton. Krome, ĝi meritas esti vaste disdonita, informcele, en la universitataj kaj edukistaj medioj, pro la prestiĝo de la kolekto, kaj pro la titolo de la aŭtoro, ankaŭ profesoro de angla lingvo.

— « Mahatmo Gandhi » de Huberto Rodhen, tradukita el la portugala de Delio Pereira de Souza. Tiun libron ŝatos ĉefe la legantoj kiuj interesiĝas pri la religiaj kaj spiritaj problemoj. La aŭtoro komparas la filozofion de Gandhi al la doktrino de Jesuo.

— « La tuta Esperanto » de Henrik Seppik. La reeldono de tiu rimarkinda kaj ekcepte klara libro pri la gramatiko de Esperanto estas vere salutinda.

— « Nouveau cours rationnel et complet d'Esperanto ». Ankaŭ pri tiu tre klasika sed bonega lernolibro, *modernigita* kaj reeldonita de S.A.T.-amikaro, ni atentigas ĉiujn franclingvanojn.

— « Scienca Revuo » : konvenas memorigi al la koncernataj esperantistoj, tiun interesan kaj altnivelan revuon (jara abono : 14 ned guld, aŭ 5 us. dol.)... kaj samtempe atentigi ilin pri la ekzisto de Internacia Scienca Asocio Esperantista (I.S.A.E.).

BILDOJ EL SKOTLANDO

Iama Skotlando nomiĝis Kaledonio. Ĉie, lagoj, riveroj, valetoj, montoj ; norde kaj okcidente, larĝaj estuaroj kaj longaj maraj lagoj profunde mordas la montojn.

Ni ĵus forlasis Fort-William. La Ben Nevis (1 343 m.) superstaras la valon ; sur ĝia supro kelkaj neĝo-tavoloj blanke radias. Ni estas ĉe ekstremaĵo de geologia glacia fendego : Glen More, kiu duone apartigas Skotlandon. En la 18-a jarcento oni konstruis la vojon ; en la 19-a oni fosis la kanalon inter loch Linnhe, loch Lochy, loch Ness ; ĝi entenas 29 kluzojn kaj celis protekti la velŝipojn, kiujn fluoj, rifoj kaj tempestoj de Oceano



endanĝerigis. Hodiaŭ, la motorŝipoj ne plu timas oceanon. Sur la kurtaj herboj de montetoj kaj meze de arbustoj sin paŝtas bovinoj, brunaj aŭ nigraj. Kaskado kaj torentoj fluas sur la brunaj torfoj, kiuj donas al viskio ĝian bonecon.

Loch Linnhe — Loch Lochy : La pejzaĝoj senĉese ripetiĝas ; la velkaj uleksoj, la genistoj semas sian oron sur la malhela eriko-tapiŝo. Tute supre, sur la onda linio de la montetoj siluetiĝas kelkaj arboj. Proksime de ni, el la freŝa foliaro de betuloj kaj salikoj, lumas la blankaĵo de krakatoj, tiel altaj kiel arboj.

Etaj ŝadifoj rigardas nin ; okuloj kaj nazo kaŝiĝas en nigra masko ; kelkaj havas altajn botojn nigrajn ; aliaj preferis botetojn al kiuj ili aldonis genuingojn, nigraj ankaŭ ili. Kun la kapo stara, la vurŝafoj, hieratikaj, fiere portas sur la vangoj siajn kurbajn kornojn. La ŝafpanjoj tute apudas siajn idetojn ; la abunda felo de la adoltoj pendas ĝis tero ; en vintro, tiuj pezaj lanfeloj estas malsekaj kaj frostitaj ; se la ŝafo falas, ĝi ne plu povos restariĝi. La ŝafaroj ŝajnas solaj en tiuj vastaĵoj. Estas nur ŝajno. Jen viro, biciklo ĉemane, kaj lia hundo. Kune ili estas rimarkinda taĉmento. La viro dresis la hundon ; inter si ili uzas specialan lingvaĵon ; per sia ŧajfilo, laŭ precizaj moduloj, li fajfas ; la hundo bone komprenis kaj tuj kuras por konduki precizan beston al preciza loko.

Sur la lago senmova, kvazaŭ lakita, siluetiĝas la profilo de monteto, la lanta irado de blanka nubo kaj delikata fiŝbarko. Tie ĉi la fiŝoj superabundas kaj oni bonvole donas fiŝpermeson. La altaj trunkoj de pinoj larĝiĝas en sunombrelojn. Numenioj grizaj kaj grasetaj, kun blanka ventro, senmoviĝas sur fosto ; ĉevaloj kaj poneoj pasas kun siaj rajdantoj.

KLANOJ

Tiu arbara regiono, malmute loĝata, kaŝas la domojn de la klano-ĉefoj. De tempo al tempo, la klananoj ĉi tie kunvenas, eĉ tiuj, kiuj migris al Kanado aŭ alien. Tiuj renkontoj, iam danĝeraj politikaj aŭ religiaj kunvenoj, direktitaj kontraŭ Anglujon, estas hodiaŭ precipe sentimentalaj kaj literaturaj.

Origine la Klano estis familia organizacio ; la bieno apartenis al ĉiuj kaj ĉiu ano ŝuldis respekton, fidon kaj helpon al la Ĉefo. Tiu ĉi alportis protekton al siaj subuloj. Ĉiu klano havas propran sloganon, tartanon kaj muzikon ; ĝi limiĝas al preciza regiono. La lokaj teksistoj teksis la kvadratajn desegnojn helpe de vegetalaj koloroj (radikoj, muskoj, floroj), tiutempe uzataj. Tiuj familioj, kies nomo ankoraŭ vivas, estas divers-devenaj : kelta, franca (bretonia), norvega, skandinavia, eĉ slava. Multaj sloganoj estas france skibitaj. La ŝildetoj ornamiĝas je simboloj inter kiuj salamandro kaj unukornulo.

KILTO

Post vojturniĝo jen ŝakflutisto. La muziko estas akra kaj plenda sed ankaŭ tre ritma por danco aŭ marŝado. La muzikisto havas kilton, longan mantelon kaj dupintan ĉapon ; la tenilo de la ponardo eliĝas el la ŝtrumpo, kiu lasas la genuon nuda.

Jam delonge la Skoltoj havas kilton ; origine ĝi estis longa plejdo, longa kovrilo, kiun zono ligis ĉirkaŭ la korpo ; ĝi krovis la ŝultrojn kaj pendis ĝis la genuoj ; por faciligi la marŝadon tra la montoj, oni gardis nur la malsupran parton : estas la kilto. Ĝi estas la tradicia kostumo de Skoltoj ; ĝi estas ankaŭ la milita uniformo. Princo Philippe kaj Princo Charles ĝin surmetas en specialaj okazajoj. Post la batalo de Culloden, la Angloj malpermesis kilton ; la malpermeso daŭris 36 jarojn. En



la komenco de la 19-a jarcento, Skotlando liberiĝis ; en poemoj, Robert Burns kantas la sendependecon ; Walter Scott skribas siajn romanojn kaj Sir Henry Raeburns pentras la Klan-ĉefojn kun siaj kiltoj. Oni kantas la rekantaĵon « Estas nur Revido ». Kiam Georges VI venas al Edinburgo en 1822, estas Walter Scott, kiu organizas la ceremoniojn : oni vidis nur kiltojn. Reĝino Viktoria, fiera pri siaj skoltaj prapatroj, permesas kilton en Balmoral, eĉ por la servistoj. Hodiaŭ oni ankoraŭ vidas kiltojn en kelkaj regionoj. Tamen oni gardas ilin por folkloraj dancoj, festoj, edziĝoj, oficialaj ceremonioj ; laŭ la cirkonstancoj, la viroj surmetas kun ĝi ordinaran jakon, vesper-jakon aŭ veluran jakon ornamitan je punta ĵaboto. La kilto bezonas 6 metrojn da ŝtofo, ĉar faldumita ĝi devas montri la ekzaktan desegnon. Estas Georges VI, kiu la unua surmetis la dupintan ĉapon. Kelkfoje tiu ĉapo havas aglo-plumojn (3, 2 aŭ 1 laŭ la titolo de la Sinjoro). La har-ĉapo estas por la soldatoj.

Kilto estas nur vira vesto. En la ceremonioj, la virinoj prefere surmetas longajn helajn robojn, sur kiuj larĝa rubando montras la kolorojn de la Klano.

LOCH NESS

Laŭ larĝaj bukedoj, laŭ altaj heĝoj, la rododendroj randostaras nian vojon ; la pompo de iliaj rozkoloroj, de iliaj violbluoj, de iliaj purpuroj naskas nian admiron.

Loch Ness situas en larĝa valo ; ĝi estas longa je 36 km., larĝa de 3 km., kaj profunda de 225 m. Fort-Augustus estas la plej norda punkto de la Kaledonia Kanalo. Jen Urquart-kastelo, ĝi estas malnova kaj ruinigita, kun hedero sur la fasado kaj dika lilako-bukedo. Arboj, kun burĝonoj apenaŭ malfermitaj, randostaras kvietan galfeton. Ĉu estas ĉi tie ke oni ekvidis la Monstron ? Tio okazis dum vintro 1933-34. Fraŭlino Mary Hamilton rakontis pri eksterordinara aperaĵo. Poste ankaŭ aliaj personoj ĝin ekvidis. Oni sendis policanojn, kiuj tage kaj nokte observis la lagon, sed ... nenion vidis. Por eviti ĉian trompon oni ĉirkaŭbaris la lagon. Finfine oni denove plurfoje vidis la beston. Oni ĝin desegnis, fotis, filmis. Oni ĝin reproduktis el sukero, el ĉokolado ; oni faris laŭ ĝi ludilojn. Kelkaj sciencistoj certigis la ĉeeston de besto nekutima en Loch Ness, eĉ la naturalisto Oudermans, kiu jam estis studinta la Marajn Serpentojn. La specialistoj certigis, ke temis pri grandstatura foko aŭ lutro, kiu elvenis el la maro dank'al subtera fluo. Kelkaj skotaj lagoj kutimas je tiaj aperaĵoj, ŝajne tute ne danĝeraj, escepte por la fiŝoj, kiujn ili tre frandas.

La besto, kiun oni vidas sur la fotoj igas pensi pri la pruo-figuraĵoj de la drak-ŝipoj, sur kiuj navigis la Vikingoj. Ĉu la Vikingoj skulptis tiujn drakojn laŭ aŭtentikaj monstroj, aŭ laŭ maraj serpentoj ? Cetere, tiuj ĉi estas multnombraj en la norvegaj maroj.

LA UNUAJ HISTORIAJ EVENTOJ


Kelkaj gaelaj skribaĵoj memorigas al ni, ke la Keltoj venis ĉi tien, el la kontinento en la 4-a kaj 2-a jarcentoj ant. Kristo. La Druidoj perdis sian potencon, kiam la Romanoj instaliĝis en Britujo. Tiam, la nordaj triboj (Piktoj kaj Skotoj) atakis ĝis Londinium. Por sin protekti, Antonin kaj Hadrien konstruigis murojn. Tamen Agricola ne sukcesis venki Kaledonion. La Romanoj foriris, kiam ilia patrujo estis minacata. Kennet 1-a unuigis la skotajn tribojn : Skotlando estis naskiĝinta !

Siaflanke, la Suduloj petis helpon de la Saksuloj. Angloj kaj Jutoj alkuris. La ĉi tieaj triboj, el bretonia deveno, ribeliĝis. Ilia reĝo Arthur kaj la Kavaliroj de la Ronda Tablo famiĝis en legendoj. Tiam la dana Knut 1-a reĝas sur la tuta Britujo kaj eĉ sur Skotlando. Kaj, en 1306, Robert Bruce, de Normandia deveno kaj reĝo de Skotlando estas devigata forfuĝi ĉe la « Highlanders ».

Tiam famiĝis la Stuart-familio. Tiu vorto Stuart anstataŭis la originan vorton « Steaart-Stewart-Steward » kiu signifas « Ĉefservisto ». Tiuj Stuart donis 14 reĝojn al Skotlando inter kiuj 6 al Anglujo. Ni pli bone konas Marie Stuart, vidvino de François II de Francio, reĝino de Skotlando kaj malamikino de Elizabeth la unua.

Kardo, simbolo de Skotlando

La Norduloj estis defendantaj sin kontraŭ la atakoj de la Saksuloj. En tiu tempo oni batalis dum tago kaj dormis dum nokto. Sed, dezirante surprizi la Skotojn, la invadantoj atakis dum nokto. Sed Libereco viglis sub formo de modesta kardo. Unu el la atakantoj maršis sur... kardo... kaj kriis... kaj vekis la Skatojn kiuj forpuŝis la malamikojn !



ANEKDOTO

Oni ofte mokas la avarecon de Skotoj. Tamen oni devas memori, ke ilia neriĉa lando devigis ilin al granda ŝparemo.

Aer - bapto

Maljuna Skoto volis plezurigi al sia edzino. Li proponas al ŝi aer-bapton. La piloto postulas 5 pundojn !

— Estas tro ! krias la viro.

Dum la tuta semajno, ĉiutage, li revenas por peti pli malfortan pagon. Finfine la piloto diras :

— Venu ! Estos senpage, kondiĉe, ke vi ne diros eĉ unu vorton.

— Konsentite !

La piloto faris ĉion eblan : supreniradoj ! malsupreniradoj ! lopoj ! « mortaj folioj » !

Finfine, sufiĉas, eĉ por la piloto.

Sed la maljunulo nenion diris :

— Gratulojn ! diras la piloto ; kiel konsentite, estas senpage !

— Jes, respondas la maljunulo ; mi nenion diris ; tamen estis tre malfacile... precipe kiam la edzino falis el la aviadilo !

Lingva problemo en Belgio

ALIA SONO

Al artikolo aperinta en « Kulturaj Kajeroj » de majo-junio 1973, necesas nepre respondi kaj prezenti al la legantoj objektivan raporton pri la situacio nunepoka. Tuj en la unua paragrafo aperas jam eraro ! Pri la bruselregiona popolo oni ne citas nombron. Kial ? ĉar kiel ĉiuj flandraj naciistoj, Sro Roose enkalkulas ĝin en la 66 milionoj da Flandroj. Rimarku ke tiu nombrado ripozas sur malcerteco ; neniam demokrata konsultado de la popolo okazis pri la elekto de la lingvo kiu ankoraŭ ĝis nun estas konstitucie libera en tuta Belgio.

Ĝis antaŭ dek jaroj estis en la ĉiudekjara popolnombrado, demando pri la lingvo de ĉiu hejmo. Oni konstatis ĉiufoje, en la brusela regiono gravan progresantan franciĝon de la enloĝantoj. Tuj kiam la flandroj akiris pli da parlamentanoj ol la cetera belga popolo ili sukcesis — helpe de valonaj kaj bruselaj parlamentanoj de la tradiciaj partioj — forigi tiun prilingvan popolnombradon. Pro tio la bruselregiona « Fronto Demokratia de la Francparolantoj » kontestas la objektivecon de tiuj ciferoj kaj postulas demokratan konsultadon de la tutbelgia popolo pri la uzata lingvo. Ĉu ne racia ? Ĉu ne demokratia ?

Estas vere ke ĝis la aŭroro de la 20a jarcento la popolamaso en Flandrio estis senkultura, malalta klaso. Ĝi parolis siajn diversregionajn dialektaĉojn, kiel skribas Sro Roose, kaj ne kulturan lingvon. Necesas akcenti ke tiun socian malaltan staton starigis kaj plutenis la flandraj superaj klasoj, t.-e. nobelularo kaj prelatoj de la katolika eklezio kiuj franciĝis kaj adoptis la francan kulturon kaj lingvon. Ili instruigis kaj edukigis siajn infanojn en nordfranciaj edukejoj aŭ en flandraj privataj katolikaj instruejoj franclingvaj. Tio klarigas kiel estiĝis en Flandrio, plejado de Flandraj franclingvaj kaj talentaj verkistoj : Emile Verhaeren (1855-1916), Maeterlinck (1862-?), Rodenbach (1855-1898), Sino M. Gevers, Sino S. Lilar, Sino Mallet-Joris, la tri lastaj de la 20-a jarcento. Al tiu reakcia regantaro la flandra popolamaso precipe kamparana, religiema kaj rezignema, submetiĝis kaj nur tre malfrue reagis sur kultura kaj politika kampoj. Pri tia aspekto de la situacio ĝis 1930, mi supozas ke ĉiu konsentos pri absoluta senrespondeco de la bruselanoj.

Temas tie pri konata historia leĝo ke subprematoj, ĉefe ties superaj klasoj, adoptas la lingvon kaj kulturon de siaj pli evoluintaj subpremantoj.

Estas vere ke ekde 1930 LA FLANDRA LINGVO pli kaj pli fariĝis kultura lingvo de la flandra intelektularo sed apenaŭ de la popolamaso.

BRUSELO, antaŭ pluraj centjaroj flandrlingva, akceptis tre rapide la francajn lingvon kaj kulturon pro enveno de valonoj kaj de francoj kaj rapida disvolviĝo de komercaj kaj kulturaj rilatoj kun industriaj valonio kaj francio. Tiu evoluo influis rapide la komercistan kaj laboristan klasojn. Tiagrade ke aktuale en la tuta brusela regiono, t.e. urbo Bruselo plus pli malpli 25 ĉirkaŭantaj komunumoj (proksimume 1.250.000 loĝantoj) 85 % estas francparolantoj kaj 15 % flandrparolantoj. Tiujn ciferojn kontestas la flandraj partioj.

Oficialaj statistikoj : naskiĝoj, geedziĝoj, enskriboj ĉe armeoservo, forpasoj, legataj gazetoj, nombro de spektakloj, k.t.p. indikas drastan plimulton por la franca.

Nur oficiala demokratia konsulto de la popolo pri ĝia lingva elekto solvus tion definitive.

Aliparte, la tutlandaj balotoj de 1961 ĝis 1971 en la brusela regiono kaj en Valonio esprimas klare la franclingvan reagon kontraŭ kiuj perfidis la francparolantojn.

Ni citu procentojn de la du partioj kiuj regis la landon.

En Bruselo	Kristansocia (2 lingva)	Socialista (dulingva)
1961	28 %	40 %
1965	19 %	26 %
1968	28 %	20 %
1971	20 %	18 %

Ili perdis do 50 % de siaj voĉdonantoj.

En Valonio	Kristansocia (2 lingva)	Socialista (dulingva)
1961	30 %	48 %
1965	23 %	37 %
1968	21 %	35 %
1971	20 %	34 %

En Valonio ili perdis do preskaŭ 1/3 de sia voĉdonantaro.

Klare tio parolas. En brusela regiono, dum 1962-1963, la socialista partio sekvis la landpartian decidon por eviti splitiĝon en lingvajn grupojn.

Rezulto : 15 bruselaj socialistaj parlamentanoj en 1960 ; 5, en 1971, kaj ili timegas novajn balotojn kiel fajron !

Libero : La nunaj prolingvaj leĝoj pri instruado kaj administraj aferoj estas inspiritaj de naziaj principoj : « ŝtata ordonpovo pri translokigo de popoloj » **sen iu ajn konsultado de la koncernataj homoj ;** « rajto de l'grundo » en la prilingvaj aferoj.

Bruselo, kiel ĉiu granda urbo, kreskis de jaro 1925 ekster sia teritorio kaj influis la ekonomion, industrion, kaj kulturan vivon de sia ĉirkaŭajo. Multaj urbanoj allogitaj pro la malalta prezo de la grundo konstruis en tiu flandra ĉirkaŭaĵo kiam ankoraŭ estis la prilingva libero. En la daŭro de la jaroj etaj minoritatoj iĝis larĝaj kaj iafoje eta majoritato. De 1963 : la leĝoj prilingvaj en instruado kaj administraciaj aferoj rompis la situacion en tiuj komunumoj. Oni nur ankoraŭ toleris uzi iagrade la francan sed postulas ke la infanoj estu instruataj en la flandra. Okazis disputoj, bataloj pro tiuj ŝanĝoj.

Sekve la ŝtato aprobigis leĝon en 1972-73 kiu starigis ĉirkaŭ Bruselon federaciojn de komunumoj flandraj en kiuj **ĝi enpuŝis la komunumojn kun franclingva minoritato** (ĉu eta, ĉu larga, ĉu eĉ iĝinta majoritato), dronante ilin en flandraj administracioj kie la francparolantaj konsilantoj ne rajtas paroli sian lingvon kaj eĉ ne ĵuri en la franca.

Samokaze Bruselo estas katenita en « punkolringo » kiu malebligas al ĝi la racian teritorian disvolviĝon kiun konas Antverpeno, Gento, Lieĝo, Charleroi, kaj ĉiuj grandaj urboj eksterlandaj.

La socialistaj sindikatoj de la brusela regiono kontraŭstaras forte. Ilia agadareo etendiĝas ekster la rigoraj administraciaj kaj lingvaj limoj.

Libero ! En Belgio, patro rajtas libere eduki siajn infanojn ĉu religie, ĉu sendie ; li ankaŭ rajtas elekti por ili ĉu la katolikan lernejon, ĉu la laikan. **Kial li ne**

rajtus elekti la lingvon en kiu li instruigos siajn posteulojn ? Nur li povas racie juĝi, pro siaj spertoj de laboranto, en Bruselo ĉefe, kian lingvon, francan aŭ flandran, plej taŭgas por la estonto de siaj infanoj. Kial en Valonio, kaj en Flandrio oni povas libere elekti kiel duan **eksterlandan idiomon,** dum en Bruselo la dua **devas** esti la flandra ? Ĉiam estas la bruselanoj kiuj rajtas krii pro diskriminacio !

Norde de Lieĝo, ekzistas 6 komunumoj, « Les Fourons », kiuj de tre longe apartenis al provinco Lieĝo. La registaro, por plaĉi al minoritato de iliaj loĝantoj kaj eksteraj agitistoj flandraj, translokigis la ses vilaĝojn al Flandrio sen konsultado ! Ekestis egaj protestoj kiujn la flamingantoj venintaj el ekstero punis per perfortaĵoj kaj detruoj.

Sesfoje, okaze de balotoj, la enloĝantoj per 60 % de voĉoj elektis la kandidatojn de la « Listo por reiro al Lieĝo ». Ĝis nun vane !

La nova (dekjara) partio brusela, la « Fronto Demokratia de la Francparolantoj » (F.D.F.), kiun aliĝis miloj da fuĝintoj el la tradiciaj partioj, rikoltis 51 % de la voĉoj ĉe la plej freŝdataj batoloj, la 7-an kaj 21-an novembro 1971-a.

Tamen la registaro opiniis ke je sia avantago, ĝi flikis la porbalotleĝon. Ĝi rafinis ĝin celante strangoli la decideman volon de la brusela popolo. La rezulto frakasis la diablan konstruaĵon mirkonsternante ĉiujn aliajn partiojn.

Per ĉiaj imageblaj manovroj indaj de diktatoroj la registaro malebligis la starigon de la « Tutbrusela Konsilantaro ». Kiam finfine tiu-ĉi estis starigita, la registaro bremsis ĉiumaniere ĝian funkciadon. La brusela popolo memoros pri tiu skandalo same kiel pri la disrabado de la centro de Bruselo far de la flamingantaj stratulaĉoj. Tiuj ĉi enviciĝis en la manifestacio de tuteŭropaj agrikulturistoj venintaj por defendi antaŭ la « Komuna Merkato » siajn laborkondiĉojn.

Dum la proceso evidentiĝis ke la arestitoj ĝenerale estis flandroj kaj ke ili havis nenion komunan kun agrikulturo ! Ili trovis favoran okazon por plensatigi sian venĝon ofte promesitan al Bruselo. Spite la krokodilajn larmojn de la flandriaj gazetaro kaj partioj, neniu dubis pri la respondeculoj de la afero !

EKONOMIO. 25 % de la impostoj, 25 % de la ŝparmono de la tuta lando venis de brusela regiono al la ŝtata financejo kaj al la ŝtata ŝparkaso en 1970. En 1971, la ŝtato dispartigis jene la oficialajn investojn al industrio kaj publikaj laboroj :

a) 16 miliardoj da belg. fr. al Flandrio + pli malpli egalan sumegon por konstrui artefaritan marhavenon en Zeebrugge tre kritikita de kompetentuloj, eĉ en Flandrio. Multaj opinias tiun aferon miliardojn ĵetitajn al la maro por eviti disputojn gravajn inter flandriaj regionoj.

b) 13 miliardoj al Valonio kiu travivas plej draman disfalon de siaj industrio kaj komerco, kaj progresanta senlaboreco.

c) 1,5 miliardo al brusela regiono kiu perdis 20.000 laborokupojn en kelkaj jaroj kaj kiu bezonegus grandegajn sumojn por plirapidigi la lantan konstruon de sia subgrunda fervojo pro kreditmanko.

Grandaj publikaj laboroj. Sro Desaeger, flandra kristan-socia ministro de publikaj laboregoj devis forlasi sian postenon, ĉar li projektis trairigi la centron de la urbo per siaj aŭtostratoj. Li fariĝis ministro por publika sano.

Apenaŭ instalita li atakis la franclingvan kuracistaron kiu tamen estas nun, kaj pli kaj pli, dulingva en la publikaj hospitaloj de la tutregiona Bruselo. Kontraŭleĝe li postulas aplikon al tiu oficiala kuracistaro de leĝo kiu **nur koncernas la administraciajn superulojn de Bruselo kaj ĉirkaŭajo.**

Kontraŭ tio, rea protestado kompreneble eksplodis dum mi redaktas ĉi-tiujn liniojn.

Por ĉiu objektiva observanto la celo eĉ ne plu estas ke dulingveco estu ĝenerala, sed la konkero ĉie en brusela regiono de la komandpostenoj por naciistaj flandroj sen iu ajn ĉefa priokupo pri la valoro profesia de la kandidato.

Flandrparolantoj en Bruselo :

Ne estas vere ke flandrlingvanoj ne estas akceptataj kiel iu ajn. Ripetado senĉesa de situacio vera antaŭjardekoj, sed de jaroj plene normaligata. En ĉiuj komercejoj, ĉio estas dulingve anoncata, etiketata, same en tramoj kaj busoj, en kinejoj, pri la stratnomoj, en la bankoj, en ĉiuj oficialaj ejoj, turistaj oficejoj publikaj kaj privataj. Ĉiuj policistoj estas dulingvaj. Kompreneble ke flandro povas esti alparolata france en urbo kie 85 % de la loĝantoj parolas france.

Ĉu flandro portas survizaĝe indikon pri la lingvo parolata ?

En grandaj magazenoj, gevendistoj ne ĉiuj estas dulingvaj. Tio estus superflua. Sufiĉas larĝe ke ĉiam tuj povas esti vokata nederlandlingva vendist(in)o. Estas vere la objektiva nuna situacio. Tiu postulo ke ĉiuj estu nepre dulingvaj en urbo kie la loĝantaro estas 85 % franclingva estas troigaĵo kiu ilustras la ĝeneralan trudeman karakteron de postuloj de iuj flandroj kiam ili troviĝas en Bruselo. Tipa signo de persekut-komplekso, datumanta de antaŭ jarcentoj, ĉe subpremata popolo kaj pri kiu la bruselanoj absolute ne respondecas.

Pri la infanvartejoj, pri la lernejoj :

La ŝtato kreis en Bruselo kaj antaŭurboj pure flandrlingvajn vartejojn por geknaboj 21 tagaĝaj ĝis 3 jaraj, kvankam jam ekzistis dulingvaj starigitaj de la komunumoj ja rimarkinde nombre ne sufiĉaj ĉar la financoj por tiaj utilaj aferoj ĉiam mankas. Por plaĉi al la flandraj ekstremistoj oni trovis tuj kelkajn miliardojn por konstrui, aĉeti, ekipi tutmoderne la pure flandrlingvajn. Tio estiĝis antaŭ pli malpli 3 jarojn. Kiel antaŭvidite la geinfanoj estas en ili tre malmutaj. Tio kompreneble okazigis kolerajn protestojn ! La samo okazis pri pure flandraj Froebellernejoj kaj elementaj unuagradaj. Tiu malŝparado kreis, kreas konfliktojn ĉar geinstruistoj funkciantaj en la franca sektoro laboras kun 30-35 gelernantoj dum en tiuj novaj pure flandraj klasoj ili troviĝas antaŭ 8-10 geknaboj kaj pli malpli 20 neokupitaj pupitroj.

La brusela popolo kondamnas tiajn farojn kaj ribelas. Hontomuro en iaj lernejoj apartigas la franclingvajn lernantojn de la flandrlingvaj.

Konkludo :

La franclingvanoj en Brusela regiono daŭre devas sin defendi kontraŭ perforto kaj premmezuroj de la belga ŝtato. Tio iĝas netolerebla ! Kreskas senĉese la konvinko ke sola solvo estas splitigo de Belgio en tri regionoj plene memstaraj — sen ia ajn kuratoreco far de tutnaciaj instancoj — Flandroi, Valonio, Brusela regiono.

La plej bonan mi rezervis por fini mian rebaton.

Estas « Lingva Komisiono » de la « Flandra Kultura Konsilio ». Ĝia lasta dekreto en sia artikolo 12, antaŭvidas enkarcerigon oktagan aŭ monatan kaj monpunon da 26 ĝis 500 belg. fr. (multobligota per 30) por kiu malobeos la dekreton. Ĉi-tiu malpermesas uzi alian linvon ol la flandran, ĉu buŝe, ĉu skribe en flandraj entreprenoj ĉu publikaj, ĉu privataj.

Mi finos citante vortojn de parlamentano : « Oni kredas sonĝi legante tian tekston en 1973. Kompatinda Belgio kaj plendinda registaro, komplico de tiaj ordonojn » !

M. VAN AELST (Bruselo).

LA UNIVERSALA DILUVO

Ĉu legendo aŭ historia fakto ?

En la okcidentaj landoj, edukitaj laŭ la judakristana kulturo, la rakonto pri ĝenerala inundego nomita « universala diluvo » estis dum longa tempo akceptita kiel nepra verajo. Efektive, ni legas en la Biblio (Genezo, 6a. ĉapitro) : « Kaj la Eternulo diris : Mi ekstermos de sur la tero la homon, kiun mi kreis, de la homo ĝis la rampaĵoj, kaj ĝis la birdoj en la ĉielo ; ĉar mi pentas, ke mi ilin kreis. Sed Noa akiris plaĉon en la okuloj de la Eternulo ». Do, vidinte ke « granda estas la malboneco de la homoj sur la tero, kaj ke ĉiuj pensoj kaj intencoj de iliaj koroj estas nur malbono en ĉiu tempo » Javeo decidis ekstermi la homaron, escepte de la justulo Noa, lia familio kaj paro de ĉiu vivanta besto. Tiel, naskiĝos alia homa raso senpeka, kaj novaj bestaj rasoj, kiuj multiĝos, kaj denove priloĝos la teron.

Kompreneble, tiu historio estis senhezite akceptita de la popolo. Sed pli pensemaj homoj demandis al si, ĉu ĝi estas vera fakto, aŭ nur fablo transdonita de generacio al generacio. Kaj la serĉantoj konstatis, ke la Grek-Romana civilizo, origino de nia kulturo, ankaŭ havas tradicion pri la diluvo.

Eĉ la greka mitologio rakontas pri du diluvoj. La unua estas konata kiel la « diluvo de Oĝiĝiso » laŭ la nomo de tiam reganta reĝo, pri kiu ni havas neniun alian informon. La dua diluvo estis decidita de Zeùso pro la perverseco de la homoj. Nur saviĝis unu homa paro, Deùkalio kaj lia edzino Pirha. Ilia barko algrundiĝis al monto Parnaso, sur kies supro loĝadis la dioj. Grimpante la monton por danki la diojn, la gehomoj deprenis ŝtonojn de sur la tero, kaj ĵetis ilin malantaŭ sin. La ŝtonoj ĵetitaj de Deùkalio naskis virojn, tiuj ĵetitaj de Pirha naskis virinojn. Tiel kreiĝis la nova homaro.

Tria diluvo estas rakontita de Platono en du el liaj famaj dialogoj : « Timeo » kaj « Kritio ». Li raportas asertojn de Egipta pastro, kiu diris, ke antaŭ 9000 jaroj (tio estas ĉirkaŭe 12000 jaroj antaŭ nia epoko), okazis granda kataklismo, kiu dum « unu tago kaj unu nokto » detruis la tiaman urbon Ateno, kaj tutan grandan insulon aŭ kontinenton nomitan Atalantiso. Ĝi sinkis kaj malaperis en la Atlantikan Oceanon.

Plie, la orientalistoj kaj arkeologoj trovis similajn rakontojn en la orientaj landoj kaj en la skribaĵoj de malaperintaj popoloj, eĉ ankaŭ ĉe la Amerikaj Indianoj. Iom strange, oni trovas en ĉiuj tradicioj tre similajn elementojn ; pro la perversiĝo de la homoj, la supera dio decidis ekstermi la homaro kaj la bestaron. Sed li antaŭe avertis unu saĝulon, foje reĝon, kaj donis al li instrukciojn por konstrui grandan ŝipon por savi sin, sian familion, kaj paron de la diversaj bestoj.

En Hindujo, la nomo de la elektito estas Vaisùata ; en Irano, Satjavatra. En Haldeujo, la eskapinto estis reĝo Sisustros ; en Asirio, li estis Utmapiŝtim, en Ĉinujo Fo-Hi, la unua historia imperiestro. En Peruo, li nomiĝas Boĉika ; ĉe la Aztekoj, Koĉkoaĉ (Coxcoax), aŭ Tezpa.

Tia universala tutmonda tradiciaro sendube montras, ke grandaj kataklismoj okazis sur la tuta surfaco de la tero depost la apero de la homoj kaj de la unuaj civilizoj. La rakontoj transdonitaj parole de generacio al generacio kunfandiĝis en la menso de la popoloj, kaj fariĝas por ili unu sola diluvo tia, kia ĝi estis registrita, kiam oni inventis la skribarton. Simila fenomeno okazis en relative ĵusa epoko en Eùropo. La Francaj kaj Anglaj historiistoj priskribas pri unu « centjara milito » okazinta inter ambaŭ landoj ekde la jaro 1337 ĝis 1453. Fakte, dum tiu longa periodo, ne okazis unu sola milito, sed longa serio de bataloj, invadoj, kun pli malpli longaj intervaloj de paco, kaj en diversaj teritorioj de Francujo.

Ekde preskaŭ du jarcentoj, la studoj de multaj ĉiunaciaj sciencistoj, geologoj, geografoj, arkeologoj, lingvistoj k.a. en multaj lokoj, en profunda maro, per elektronikaj sondadoj montras la realecon de kataklismoj, inundegoj, vulkanaj erupcioj, tertremoj ankaŭ pro la drivado de la kontinentoj. La surface de la tero estis komplete ŝanĝita, tutaj kontinentoj malaperis, kaj novaj aperis. Nun, oni ĝenerale konkludas, ke granda tutmonda katastrofo detruis la unuajn civilizojn kun preskaŭ la tuton de la vivantoj ; homojn kaj bestojn. Laŭ kalkuloj de la sciencistoj, per la novaj procedoj, ankaŭ per astronomio, oni datigas tiun kataklismon proksimume inter 10 000 ĝis 12 000 jaroj antaŭ la nuna epoko. La plej ĝenerala opinio estas, ke tiam, la tero « renversiĝis », kaj perdis sian antaŭan ekvilibron. La akso de la globo kliniĝis po 45 gradoj rilate je la ekliptiko. La tiama ekvatoro fariĝis la polusan linion, kaj la tiamaj polusoj troviĝas nun en la ekvatoraj regionoj. Tio ne estas simpla hipotezo ; ĉar faktoj ĝin konfirmas. Nur la kaŭzo de tiu subita katastrofo ne estas konata. Ĉu alproksimiĝis al nia globo granda kometo, kies potenca magnetismo perturbis la teran magnetan ekvilibron ? Ĉu falis sur la teron dika meteoro, eble asteroido ? Eĉ povis esti ambaŭ sinsekvaj fenomenoj. Unue, renversiĝo de la polusoj kaŭzinta perturbon de la rivoluo de la tero sur sia orbito, okazigis kolizion kun la luno aŭ iu asteroido. ĝis nun, ni ne scias. la sciencistoj tre zorge studas tiujn diversajn hipotezojn.

Tamen, ni povas rimarki, ke la probabla dato de la kataklismo koincidas kun la aserto de Platono pri la submergo de Atlantiso. Dum jarcentoj oni opiniis, ke tiu rakonto estis nur legendo aŭ mitologia fablo. La eltrovaĵoj de diverslandaj sciencistoj montras, ke ĝi havas historian fundamenton nun science pruvitan.

Fakte, la tutmondaj tradicioj parolas pri almenaŭ tri malaperintaj kontinentoj : Lemurio aŭ Mu kies unu parto estis probable la tradicie mistera lando Gondùana, Atlantiso kaj Hiperboreo. Lemurio etendiĝis de la Japana maro gis la orienta marbordo de Ameriko kaj unu kuŝas sur la fundo de la Pacifika Oceano. Atlantiso estis granda insulo en la Atlantika Oceano, kaj mergiĝis en ĝin. Hiperboreo estis riĉa kontinento nun surkovrita de la glacioj de la Norda Poluso.

Nun, la scienco ne plu dubas pri la iama ekzisto de tiuj kontinentoj. Dum preskaŭ du jarcentoj, pruvoj akumuliĝis, kaj ĉiutage, novaj trovoj ilin konfirmas. Centoj da libroj, miloj da artikoloj en sciencaj revuoj aŭ gazetoj estis verkitaj de arkeologoj, paleontologoj, astronomoj, lingvistoj — kaj ankoraŭ oftege aperas.

Ŝajnas, ke la plej antikva kaj vasta el tiuj « perditaj kontinentoj », Lemurio, estis jam parte detruita antaŭ la granda lasta katastrofo, kiu fine detruis ĝin samtempe kiam Atlantison, kaj kredeble Hiperboreon. Sur tiuj kontinentoj, ekzistis tre malnovaj kaj tre evoluintaj civilizoj. Precipe dum la lasta jardeko, gravaj kaj mirindaj restaĵoj de ilia alta kulturo eltroviĝas en ĉiuj partoj de la mondo. La sciencistoj, kredas, ke tiuj primitivaj civilizoj daŭris proksimine 300000 jarojn ; sekve ili havis longan evoluadon, kaj povis atingi rimarkindajn rezultatojn.

La amplekso de la temo malebligas ĝin pritrakti eĉ resume en unu sola artikolo. Ni do intencas verki aliajn artikolojn pri tiuj « perditaj kontinentoj ».

Eloi MOTILLON.

P. S. — La citaĵoj el la Biblio estas faritaj laŭ la traduko de D-ro Zamenhof.

Hungaraj fantastikaj filmoj

Nun estas modo la futuro, la fantastiko, la sci-fi-rakontoj kaj filmoj. La futurologio fariĝis aparta scienco kaj decide volas montri, kia estos la estonteco, ke la homo povu sukcese lukti kun la zorgoj kaj taskoj de la futuro. La tiuspecaj romanoj, rakontoj kaj filmoj volas distri per siaj imagoj kaj prezentas la novajn ĝojojn kaj ofte la atendeblajn terurojn de la venonta epoko.

Similan celon havas la populara scienca instruo per filmoj, rakontoj, kia estos la futuro. Antaŭ jarcento tion efike faris la franca verkisto Julio Verne, kiu preskaŭ ĉiujn nunajn inventojn kaj progresojn priskribis en siaj fantaziaj kaj interesaj romanoj. Malmultaj scias, ke antaŭ sia morto li — fariĝante adepto de Esperanto kaj eĉ honora prezidanto de provinca Esperanto-societo — pretiĝis skribi romanon, en kiu la internacia lingvo estus havinta gravan rolon. Bedaŭrinde nek li, nek la nuntempaj sci-fi-skribantoj uzis ĝis nun tiun ĉi temon, Ankaŭ en Esperanto aperis tiaj rakontoj, ni pensu nur pri la interesaj verkoj de Sandor Szathmari.

Inter la sci-fi-filmoj eble la plej popularaj fariĝis la germana filmserio pri la Orion-spaceveturilo « subtaso » kun imagitaj aventuroj en ia fora estonto. Sed en ĝi la homoj simile pensas, luktas, ruzas kaj batalas, kiel en la nuna tempo. Mi scias ĝis nun pri du hungaraj sci-fi-filmoj, el kiuj unu jam partoprenis la sci-fi-festivalon en Trieste.

Ĝia titolo : La Areno jam montras, ke ĝi prezentas ian luktejon por montri la batalojn de tri homoj, kiuj iel trafas sin en fora, nekonata, futura ĉirkaŭaĵo, en labirinto, kie ili inter sak-vojoj devas serĉi la eliron en iun cel-kameron. Kvazaŭ en ia profunda, fantasta loko, vagante inter potencaj kulisoj ili provas serĉi, trovi, lukti. Ili ne scias, kiel ili atingis tiun teruran lokon, ili nur scias, ke iu fremda potenco prizorgas ilin per vestaĵo, nutrado, reto kaj ferstangoj. Ili iras tra fantazie malfermiĝantaj pordegoj al nekonataj pejzaĝoj kaj farante ĉion por trovi elirejon, en tiu fermiteco kaj necerteco ĉiuj reagas laŭ siaj propraj instinktoj. Ili luktas unu kontraŭ la alia kaj kiam ili fine trovas la celon, ili jam perdis sian sobrecon, mortigis unu el siaj kunuloj kaj fine por penti sian pekon ili decidas mortigi unu la alian. La futura maŝino de nekonata mondo registras ilian vojon kaj ilian lukton, ilian sorton kaj kvazaŭ perfekta komputero per elektrokardiogramo montras la rezulton : La vivantoj de ia QZ planedo estis ekzamenitaj. La esploro montras, ke al la pezo de psiĥaj atakoj ili reagis per agreso kaj ili ĉesigas unu la alian. Ili ne signifas por ni danĝeron. Ilia agado ne havas motivojn. Oni devas fari novan kontrolon.

La kontraŭdiroj kaj samtempe multaj samsencaĵoj multflankaj ne donas klaran koncepton, ĉu oni vidis nur fantazian aventuron de tri hazarde kuntroviĝantaj homoj aŭ ĉu ĝi ilustras la aventuron de la homaro ? Ĉu ĝi volas estis alvoka atentigo : ni provu resti homoj en ŝanĝiĝintaj cirkonstancoj kaj provu esplori nian racion kaj unuiĝinte trovi la eliron el la labirinto de la vivo.

La alia sci-fi-filmo havas la titolon : La fenestroj de la tempo. Kio okazos, se ... la teron terurigos la falo de fortega atom — aŭ hidrogen aŭ eĉ pli forta bombo ? Similan teatraĵon oni prezentis jam okaze de la budapeŝta kongreso.

Tiu ĉi filmo post falego de ia fantazia bombo nomita « QUARK », okazas ŝajne en la dudekdua jarcento. Tiam vekiĝas la rolantoj, ĉar la teron ekskuegis ia tertremo aŭ eble nova bombo kaj sub la tero ekfunkcias iu ŝajne jam mortinta uzino. Tie el longa vico iu maŝino suprenlevas strangajn ĉerkojn el metalo. Iu meĥanismo malfermas kaj ellevas la korpojn kaj inokulas en ilin vekigilon. Tiel ili unu post la alia ekvekiĝas. Stranga, fantasta okazintaĵo ! Kvin homoj revekiĝas, inter ili unu virino. Sed la kvina ne similas en sia konduto al la aliaj. Li estas hejmeca en la diabla laboratorio kaj liaj intencoj videble ne estas honestaj. Ili volus trovi - kiel en la alia filmo - elirejon supren, en la vivon. Sed la kvina kondutas tre suspekte. La filmo ŝajnas pli teatraĵo kun kvin rolantoj, ol filmo. Ekviviĝas eĉ sesa figuro, sed nur en la memoroj de la virino. Ili babilas, diskutas, klarigas kaj kune ili montras eble ne ian futuron, sed la reviviĝintan nuntempon. Do ĝi estas iom letargia, misagorda kaj malgraŭ la strecaj okazintaĵoj kaj efikaj kulisoj ĝi ne donas ian kontentiĝon. Ĝi ne donas la montron de la progresinta perspektivo de ia fora futuro, ian pli altan vivnivelon, pli evoluintan psiĥon, la sentigon de la socialista progreso de la estonteco.

Kiel hungara scienculo, dro Istvan Benedek esprimas sin en gazetstudo ĝenerale pri la ĝisnunaj fantaziaj sci-fi-kreaĵoj : « Kiel ajn ni pliproksimiĝas al la solvo de la sciencaj magiaj prezentadoj, despli turmente ni sentas, ke la senfina amaso de la homaro bezonus pli modestan, teorie jam delonge solvitan helpon ».

Paŭlo Balkanyi.

Ĝis revido, mia karulo

Alisa, apogita ĉe la pordo, rigardas sian edzon Martin, kiu direktiĝas al la vilaĝo. Alisa ne estas belulino, sed de post ŝia edziniĝo, la feliĉo mildigis ŝian vizaĝon. Antaŭe, ŝi travivis malfacilajn jarojn ; ŝi estis tajpistino kaj pene vivigis sin kaj sian kriplan patrinon. Dum multaj jaroj ŝi plezuriĝis kune kun Dik, sia kamarado. Tiu ĉi, ĉar li estis timema kaj gajnis malmulte, ne kuraĝis konfesi al ŝi sian amon.

Okazis, ke kuzo de Alisa mortis kaj lasis al ŝi multe da mono ; ŝi ne plu bezonis labori ; Dik, ankoraŭ pli timema, malproksimiĝis de ŝi. Ĉe amikoj ŝi konatiĝis kun Martin. Li enamiĝis al ŝi. Post unu semajno, ili fianĉiĝis. Dik, konfesante al ŝi sian ĉiaman amon, koleriĝis pro tio, ke ŝi estis edziĝonta al viro, kiun ŝi preskaŭ ne konis.

« Mi amas lin, diris Alisa ; li ne bezonis multajn jarojn por konfesi sian amon ». Dik foriris, tre malfeliĉa.

Tamen, de post ŝia edziniĝo, ŝi ĉiam faras la saman sonĝon : ŝia edzo kuŝas morta kaj Dik staras apud li.

Telefono sonas. Estas Dik ; li libertempas en la najbara vilaĝo kaj petas permeson fari viziton al la novaj geedzoj.

— Ne, seke respondas Alisa ; vi ne povas veni ĉi tien. Dik momenton silentas kaj diras « Pardonu min, mi ne volas vin ĝeni ».

Iom maltrankvila Alisa prenas sian pajlĉapelon por iri en la ĝardenon.

Estis Martin, kiu aĉetis tiun domon, ĵus antaŭ ilia geedziĝo. La proprietulo postulis 8 000 pundojn. Pro kapitaloj investitaj en aferoj, Martin disponis nur 1 000 pundojn. Alisa ĝoje helpis dank'al la kuzo-heredaĵo ; ŝi vendis valor-paperojn. La domo estas sola je 2 km. malproksime de la vilaĝo. La ĝardenisto regule venas ĉiun vendredon, kaj hodiaŭ merkredon, la aliaj servistoj ricevis forpermeson.

Alisa tre surpriziĝas, kiam ŝi vidas Georgon, la ĝardenisto, laborantan ĉe la bedoj.

— Bonan tagon, Georgo, vi eraris, hodiaŭ estas nur merkrede !

— Jen : estos festo venontan vendredon en la vilaĝo ; mi pensis, ke tiu ŝanĝo ne ĝenos vin.

— Kompreneble ne gravas kaj mi deziras al vi bonan vojaĝon ! ĉu vi scias, kiam vi revenos ?

— Dankon, sinjorino ; ankaŭ mi deziras al vi bonan vojaĝon ! ĉu vi scias, kiam vi revenos ?

— Kiam mi revenos ? El kie ?

Georgo montras surprizon : « Ĉu vi ne foriros morgaŭ matene al Londono ?

— Ne, kiu tion diris al vi ?

— Via edzo. Mi renkontis lin hieraŭ en la vilaĝo. Li diris al mi, ke vi ambaŭ vojaĝos al Londono ; li ne sciis por kiom da tempo.

— Certe vi malbone komprenis : cetere, mi tute malŝatas Londonon.

— Ha, bone, diras Georgo. Plaĉas al mi, ke vi ne foriros. Ne faru kiel la antaŭa proprietulo ; kiam li estis aĉetinta aŭtomobilon, li havis akcidenton kaj estis devigata vendi sian domon. Feliĉe ke li vendis ĝin 2 000 pundojn !

— Li eĉ ricevis 3 000 pundojn. Tion pagis mia edzo.

— Ho, la virinoj nenion scias pri la kalkuloj ; la proprietulo ĉie diras, ke li ricevis 2 000 pundojn.

Alisa pensis, ke ne konvenas daŭrigi la disputadon.

Ŝi laŭiras la aleojn, faras bukedon kaj subite malkovras inter du bedoj, la verdan agendon de sia edzo ; ŝi malfermas ĝin kaj turnas la paĝojn ; ŝi legas : la 14-an de majo, edziĝi kun Alisa, St Petro, la 14-a horo kaj duono. Certe Martin estas ordema kaj metoda, sed, tamen ! Ho, la stultulo ! ŝi diras. Sed jen hodiaŭ la 18 -an de junio, la 21-a horo... kaj nenio estas indikita. Kio estas projektita ; ŝi tute ne scias.

Kaj subite ŝi pensas, ke Dik pravis ; ŝi nenion scias pri la pasinta vivo de sia edzo, kiu estas nun 40-jara.

Post la vespermanĝo Alisa memoras pri la agendo kaj ĝin redonas al Martin : « Ĉu tiamaniere vi akvumas la florojn ? ŝi diras ; nun mi scias ĉiujn viajn sekretojn ; sed kio estas tiu rendevuo por la 9-a hodiaŭ vespere ?

— Ho, tio ! (momenton li silentas kaj ridetas) ; mi havas rendevuon kun bela virino ; ŝi havas brunajn harojn kaj bluajn okulojn tute kiel vi.

— Ho, karulo, mi ne komprenas ; vi ŝercas, ĉu vi mokas min ?

— Tute ne ; mi volis nur memori pri rivelendaj fotoj kaj mi bezonos vian helpon en la nigra ĉambro de la kelo.

— Ĉu vere estas necese tiel precize indiki la horon ?

— Mia kara, bona laboro estas ĉiam farita en preciza horo !

Ŝi rigardas sian edzon kaj sentas sin angorplenan.

— Ho, Martin mi petas vin, parolu al mi pri viaj pasintaj jaroj ! Iom surpriza, li rigardas ŝin.

— Sed, karulino vi scias ĉion pri mi ; miaj

infanjaroj en Northumberland, mia vivo en Afriko, kaj la lastaj 10 jaroj en Kanado, kiuj alportis al mi sukceson.

— La aferoj ! ŝi diris. Sed, certe vi havis amaventurojn ; vi renkontis virinojn ; mi ŝatus scii.

Martin kunpremis la brovojn : Certe aliaj virinoj okupis miajn pensojn ; tion mi ne neas ; sed mi ĵuras al vi, ke neniu el ili reprezentis ion valoran por mi.

— Pardonu al mi Martin, mi estis nervoza dum la tuta tago.

— Estas strange, respondis li, vi estas kutime tiel trankvila, tiel ŝaga.

— Ĉio malglate iris ; eĉ Georgo, kiu certigis al mi, ke vi anoncis nian voĵaĝon al Londono !

— Kie vi vidis lin ? demandis seke Martin.

Li venis por labori hodiaŭ anstataŭ vendredon.

— Kiu stultulo ! kiu kadukulo ! mi esperas, ke vi malerarigis lin ! Alisa rigardas sian edzon ; neniam ŝi vidis lin tiom kolera.

— Jes, mi klarigis ĉion ; sed li estas tre obstinkapa ; ankaŭ pri nia domo ; li certigis, ke la proprietulo petis nur 2 000 pundojn. Martin, nur post momento, respondis : « mi vidas la miskomprenon : li volis tuj 2 000 pundojn kaj la ceteron hipoteke.

Alisa rigardas la mur-horloĝon « Estas la naŭa, la ĝusta horo por la fotoj ; ĉu ni ilin faras tuj ?

— Mi ne plu deziras okupiĝi pri tiuj fotoj hodiaŭ !

La morgaŭon Alisa deziras iri al la vilaĝo por fari aĉetaĵojn. Martin firme kontraŭstaras ŝian projekton kaj insistas por iri mem al la vilaĝo.

— Kial ? pensas Alisa ; ĉu li renkontis Dik ? ĉu li estas ĵaluza ?

Sed ŝia maltrankvilo revenas.

Tuj ŝi rapidas sur la unuan etaĝon por viziti la skribejon de Martin ; kun vangoj ruĝaj, kun spiro rapida pro honto, ŝi esploras la paperojn, la tirkestojn, la poŝojn de la vestoj ; du tirkestoj estas ŝlositaj ; ŝi rapide malsupreniras por trovi lian ŝlosilaron. En la unua tirkesto estas ĉeklibreto, papermonujo plenplena je monbiletaj kaj paketoj da leteroj ĉirkaŭitaj per blua rubando (ŝiaj fianĉinaj leteroj). Nenia ŝlosilo malfermas la alian tirkeston ; fine tiu de amiko-ĉambro sukcesas ĝin malfermi. Ene troviĝas aro da ĵurnal-artikoloj (el amerikaj ĵurnaloj malnovaj je 7 jaroj). Ili parolis pri Charles Lemaire, bigamiulo. Oni suspektis, ke li mortigis siajn edzinojn (unu skeleto estis trovita sub la planko de domo, kiun li estis luinta). Liaj aliaj edzinoj estis malaperintaj.

Alisa memoras la aferon, pro nenia pruvo, oni ne povis kondamni Georges Lemaire. La ĵurnalo donis lian foton : barbulo kun inteligenta vizaĝo. Sed la okuloj .. la brovoj .. tute similas. .. Martin. Plue oni parolis pri cikatro ĉe la manartiko. Martin havas tute similan cikatron.

Alisa preskaŭ falas pro timo.

Rapide ŝi ĉion ordigas kaj malsupreniras ; Kaj pripensas : Georgo, la 2 000 pundoj, la vojaĝo al Londono, la kelo kaj ĝia pavimo facile elprenebla. La pordo de la ĝardeno grincas. Martin, ridetanta, revenas de la vilaĝo kun nova ŝpato ĉe mano.

Li ne lasas ŝin sola eĉ unu minuton ; li akompanas ŝin al la kuirejo por prepari la manĝon kaj ankaŭ sur la terason por pretigi la tablon. Dum la manĝo li diras : « Nu, ni faros tiujn fotojn hodiaŭ vespere ».

— Ĉu vi ne povas ilin fari sen mia helpo, mi havas kapdoloron.

— Ho, mi nepre bezonos vin, nur dum momento ; cetere, poste vi ne plu suferos !

Ŝi tremas ; certe li mortigos ŝin ; ŝi nepre devas trovi helpon. Subite ŝi pensas pri Dik.

— Mi volas telefoni al viandvendisto ; mi forgesis mendon por morgaŭ. Ŝi rapidas en la domon, petas la albergon : « Mi nepre deziras paroli al Dik Vindyford. Li rapidu ! »

Jam lia edzo sidiĝas malantaŭ ŝi. Kion fari ? Atedante la voĉon de Dik, ŝi rigardas la ŝaltilon de la telefono kaj ideo venas al ŝi (Dank'al tiu ŝaltilo mi povos de tempo al tempo interrompi la komunikadon).

Jen la voĉo de Dik.

— Tie ĉi sinjorino Martin. Mi petas vin venu (morgaŝ matene kun 6 bovido-kotletoj). Estas nepre necese. (Pardonu al mi, ke tiel malfrue mi vokas vin). Temas pri vivo aŭ morto ! Rapide ŝi relokas la receptilon.

— Kiel vi parolas al via viand-vendisto ! rimarkas Martin.

— Ho, estas virina ŝerco !

Martin nenion suspektis. Sed ĉu Dik komprenis ?

— Estas la oka kaj duono, li diras. Ni iru por la fotoj.

— Ne tuj, ni atendu ankoraŭ momenton, ĝis la naŭa.

— Mia karulino, estu afabla venu tuj kun mi.

— Mi preferas atendi ĝis la naŭa.

Alisa terurigita rigardas sian edzon. Lia masko falis ; li tordas siajn manojn, liaj okuloj brilas, senĉese li pasas sian langon sur siaj sekaj lipoj ; li ne plu povas kaŝi sian nervozecon. « Estas vere, pensas Alisa ; li ne plu povas atendi ! li estas freneza ».

Li antaŭeniras al ŝi (la pordo de la ĝardeno grincas). Venu tuj ! se ne, mi portos vin !

La enirpordo malfermiĝas. Dik eniras, sekvata de policano. Alisa ŝvenas.



PRI FAMA VERKISTO DE JUGOSLAVIO

Lando de la 58a U. K.

Jugoslavio estis tre fiera la 26-an de oktobro 1961, ĉar ĝia filo : Ivo ANDRIĆ ricevis la Nobel-premion por la libro « Estas Ponto sur la Drina ». La libron oni tuj konis eksterlande, ĝi estis tradukita en 21 lingvojn sed ĝis nun ne en Esperanton bedaŭrinde ! Nur « Sonĝo kaj maldormo » (13 noveloj, Zagreb 1972) estas en esperanto.

Ivo Andriĉ naskiĝis la 10-an de oktobro 1892 en Dolats, vilaĝo apud Travnik en Bosnio, en modesta familio de manlaboristoj el Sarajevo. La patro mortis, kiam la infano estis 2-jara kaj la patrino translokiĝis al Višegrad, kie la infano vizitis la lernejon, kaj poste daŭrigis la studadon en Sarajevo. Tiuj tri urboj : Travnik, Višegrad, Sarajevo estas ĉefaj tra la tuta verkado de Andriĉ. La regiono kontraŭis al la aŭstriaj okupantoj, kaj Ivo Andriĉ en julio 1914 estis arestita kun multaj aliaj ; lin oni enkarcerigis en Ŝibenik kaj Maribor. En la jaro 1918 li povis denove daŭrigi siajn studadojn. Li prezentis en Graz la doktoran tezon pri la « Intelekta Vivo en Bosnio kaj Hercegovino sub la turka jugo ».

Inter la du mondmilitoj li dividis sian vivadon kiel diplomato (tiel li estis en Romo, Bukaresto, Triesto, Madrido, Ĝenevo, Parizo, Bruselo, finfine en Berlino de 1939 ĝis 1941) kaj verkisto. Dum la germana okupado en Jugoslavio li vivas en Beogrado en soleco kaj laboreco kaj en 1945 eldonas plej grandan parton de sia verkaro. Lia verkaro estas vasta kaj tre diversa : noveloj, eseo pri Goja kaj Petrarko, kronikoj pri Bosnio. La plej interesaj verkoj estas tiuj, kiuj temas pri lia regiono kaj ĉefe : « Estas Ponto sur la Drina ».

Drina estas rivero formita el du riveretoj Tara kaj Piva, kies fontoj estas en montara Montenegro. La rivero Drina fluas de sudo al nordo tra pentrinda valo ĝis la rivero Savo, kiu sin verŝas en Danubo en Beogrado.

Sur Drina en Viŝegrad estas tre bela ponto konstruita sub turka regado dum la jaro (1571), kiam regis la veziro Mehemed Pacha Sokoli, kiu naskiĝis en bosnia vilaĝo Sokoloviĉ proksime de Viŝegrad. Tiun serban infanon 10-jaran forrabis la Turkoj laŭ la kutimo « sangimposto », kondukis lin al Istambul kaj islamigis lin. Li ricevis bonan edukadon kaj realigis tre belan karieron. Fariĝinte veziro, li deziris doti sian naskiĝan landon per bela ponto. La libro « Estas Ponto sur la Drina » estas kroniko de tiu regiono ek de la 16-a jarcento ĝis nun, sed, la ĉefa heroo de la libro, kvazaŭ persono, estas la Ponto, kiu ebligas rilatojn inter homoj.

Tiel Ivo Andriĉ rakontas la belan legendon pri la pontoj : « Kiam Alaho la Potenculo kreis la mondon, la tero estis ebena kaj glata same kiel gravurota pladego. Tio malplaĉis al la Diablo, kiu enviis tiun donacon de Dio al la Homoj. Kiam la tero estis ankoraŭ malseka kaj mola kiel pasto, li enŝoviĝis en ĝin kaj per siaj ungegoj li grategis, kiel eble plej profunde, la vizaĝon de la tero donita de Dio. Tiam aperis la profundaj riveroj kaj la krutegoj, kiuj disigis la homojn kaj malhelpis ilin vojaĝi sur la tero donita de Dio kiel ĝardeno por iliaj nutrado kaj zorgado. Alaho ĉagrenis, kiam li vidis la faraĵon de la Malbonulo. Ĉar li ne povis rekomenci sian laboraĵon, kiun Diablo malpurigis, li sendis siajn anĝelojn por helpi kaj faciligi la laboron al la homoj. Kiam la anĝeloj vidis, ke la malfeliĉaj homoj povis nek trairi tiujn abismojn kaj profundaĵojn, nek efektivigi tiujn laboregojn, ke la homoj ĉagrenegis, rigardante senespere kaj vokante unu la alian de bordo al alia bordo, la anĝeloj etendis siajn flugilojn supre de tiuj lokoj kaj tiel la homoj povis transiri sur la flugiloj : Tiel la homoj ekciis de la diaj anĝeloj, kiel oni konstruas pontojn. Do post la fontanoj, la plej granda laboro estas konstrui ponton. Granda peko estas ĝin tuŝi, ĉar ponto, kia ajn ĝi estas : simpla arbtrunko kiu transsaltas montan torenton, aŭ tiu bela artaĵo de Mehmed-Pacha, havas anĝelojn, kiuj gardas kaj firme tenas ĝin, ĉar Dio decidis ke ĝi eltenos ! ».

Ĉu la esperantistoj ne sekvos tiun viv-irejon, konigante plej vaste la internacian lingvon : ponto inter la homoj ?

Marcelle TURIN,

Kelkaj el vi ankoraŭ ne pagis sian abonon por 1973

Ankoraŭ ne tro malfrue estas, sed tamen...

TUJ REABONU

al poŝtĉekkonto :

P. BABIN, 13, bd de la Chauvinière, 44000 Nantes --- Nº 281361 Nantes

aŭ al la peranto en via lando.

POR VIA DISTRO

AMUZAJ PROBLEMOJ

Solvoj de la antaŭaj problemoj

Unua problemo

La trovota esprimo estis : Sidi kiel sur pingloj.

Oni povis rekonstrui tiun esprimon per la mezaj literoj de la jenaj vortoj :

Atmosfero — marcipano — akcidento — predikato — anarkisto — sindikato — profesoro — akvilegio — balistiko — postulato — obstrukco — aeroplano — specimeno — seminario — telegramo — ambulanco — mandolino — kanajlaro.

Dua problemo

La trovota frazo de D-ro Zamenhof estis . Simile al ĉiu lingvo. Esperanto devas esti rigardata kiel lingvo finita kaj netuŝebla.

Tiun frazon oni povis trovi dank'al la jenaj helpvortoj : esperanto — finita — alia — lingvo — kiel — netuŝebla — rigardata — devas — ĉiu — esti — kaj — lingvo — al — simile.

Novaj problemoj

La konkurso ne komencas en ĉi-tiu numero de « Kulturaj Kajeroj », kaj ni prezentas al vi kelkajn problemojn, ekster la konkurso.

UNUA PROBLEMO


VORTO-ĈENO

Eltrovu la 23 vortojn, kiuj formas ĉenon tiel, ke ĉiu vorto komenciĝas per la meza silabo de la lasta vorto Ĉiuj serĉotaj vortoj konsistas el tri du-literaj silaboj, do el ses literoj. La vortoj signifas :

1. Timema besto. — **2.** Suĉema mar-monstro. — **3.** Malrapida besteto. — **4.** Parto de la tago. — **5.** Eleganta pilkludo. — **6.** Arĝentkolora metalo. — **7.** Anĝelo. — **8.** Nigra frukteto arbara. — **9.** Vestfermilo. — **10.** Flava juvelŝtono. — **11.** Luksa domego. — **12.** Tre maldika metal-plato. — **13.** Ostinternaĵo. — **14.** Landlima imposto. — **15.** Rapidkura afrika besto. — **16.** Fanatika adepto. — **17.** La leĝo de la pensado. — **18.** Korda muzikilo. — **19.** La plej grava kreskaĵo. — **20.** Vinujo. — **21.** Bildenigmo. — **22.** Panŝmiraĵo. — **23.** Homa manĝujo.

Dua problemo

Kruc-Vort-Enigmo



HORIZONTALE. — **1.** Orienta kvarpiedulo. — **4.** Orienteŭropa lando. — **7.** Sciigo. — **8.** Mitologia marmonstro. — **10.** Politika mondorganizaĵo. — **11.** Ŝafa haro. — **12.** Nomo de monato. — **14.** Leda piedvesto. — **15.** Altvalora metalo. — **17.** Malplori. — **19.** Subtera ĉambro. — **21.** Duonĉevalo. — **22.** Altvalora ludkarto. — **24.** Kungluilo de brikoj. — **26.** Besta manĝujo. — **27.** Norditala urbego. — **28.** Batalo de mortanto.

VERTIKALE. — **2.** Antaŭkristnaska tempo. — **3.** Malfraŭlo. — **4.** Mezeŭropa ĉefurbo. — **5.** Preni ĉambron por uzo. — **6.** Abrahamidoj. — **9.** Malpurega kvarpieduleto. — **12.** Akvego. — **13.** Sudeŭropa ĉefurbo. — **16.** Nordeŭropa ĉefurbo. — **18.** Fari bildon krajone. — **20.** Manĝebla riverfiŝo. — **21.** Vivĉeso. — **23.** Maleleganta kvarpiedulo. — **25.** Sankta nombro.

Tria problemo

LITERA ENIGMO

La solvo konsistas el 72 literoj, kiuj estas numeritaj. La ŝlosilvortoj estas la sekvantaj :

24 6 5 34 17 9 28 2 55 21 13 10 23 = muziklernejo.

36 15 43 4 51 26 1 31 = sentima viro.

64 35 54 55 12 3 53 8 64 38 = lasta volo.

14 25 22 19 27 41 52 = ruĝlitera tago.

62 67 16 29 37 33 66 17 39 55 58 = kuracilo.

15 60 40 30 35 59 57 42 18 46 44 45 11 70 = asocio de mondunuigantoj.

71 48 3 68 50 49 63 72 = mezgrada lernejo.

20 56 7 32 6 = glacipluvo.

69 65 22 21 47 61 9 23 = rusa akvoboligilo.

1 — 72 = **malnova hinda proverbo.**

GRAMATIKO PER BONHUMORO



Inspiro

— Ĉu tio estas tiel komplika ! Mi volas nur foton por mia identiga karto.

— Ja, sed komprenu. Por ke via vizaĝo estu kiel eble plej ĉarma, necesas, ke ĉiuj viaj ĉarmaĵoj inspiru vian rigardon ... kaj ankaŭ tiun de la fotisto.

SINGULARO

Difino (P.V.). — Singularo montras, ke oni parolas pri ununura persono aŭ afero.

La vorto estas kun O — A — finaĵo : mia eksterlanda libertempo.

RIMARKOJ

1) **Pantalono** estas en singularo por montri ununuran veston.

2) **Kelkaj substantivoj en singularo** montras grupon :

— amaso, gento, nacio, taĉmento ;

— ni kreu homon kaj **ili** regu super la fiŝoj (Z).

3) **Pri aferoj PO-UNU posedataj de pluraj personoj,** oni gardas singularon : la laboristinoj turnas la kapon (**NE** : la kapojn). Por eviti konfuzon oni povas uzi **ĈIU** :

— tiuj riveretoj havas (ĉiu) sian fonton en la altebenaĵo.

Se ni dirus « havas siajn fontojn » tiu signifus, ke ĉiu rivereto havas plurajn fontojn.



Cele al svelteco

Ho ! paĉjo, ĉu vere vi ankoraŭfoje forgesis, ke hodiaŭ estas sabato ! estas la senmanĝa tago de panjo. Atendu min, ke ambaŭ ni iru al restoracio.



Ĉu misuzo ?

Karulino ! helpu al mi ! Estas al mi neeble retrovi la dent-past-tubon ! Kie vi ĝin metis ? Almenaŭ diru al mi je kiu koloro ĝi estas !

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (45 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (85 fr.).

Britujo : S-ro John Rapley, 156, Wanstead Park Rd., ILFORD, Essex IGI 3TP, ĝiro 50 292 3008 (90 p. aŭ 135 p).

Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (2 us. dol).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE. Ĝiro 6.83.46.

Finnlando : S-ro Jussi Jäntti, Esperantotie 4, SF 02220 IRISLAHTI (10 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (6,2 mk.).

Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO (110 pes.).

Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (1.000 lir.).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (640 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1520 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (7 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN.

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Rumanio : S-ro Adrian Boldan, al. Valea Rosie 4, ap. 69, B.P. 8/4 BUKURESTI - 66.

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 233 Rostov Don — 7.

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack, 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (12 kr.)

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE.

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (3 us. dol.).

Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (3 dol.).

Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anonciatajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN.

Supplément au n° 5 de 1973, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Août empiète sur septembre et les derniers jours de l'été sont splendides à Grésillon. Douze personnes seulement en profitent car peu nombreux sont ceux qui prennent leurs vacances à cette époque de l'année et la rentrée scolaire proche a ramené la plupart des familles au foyer. C'est le calme, le grand calme au château et dans le parc. Il nous faudra sans doute revoir la question de ce quatrième stage.

Trois semaines surchargées en juillet, le reste de l'été participation moyenne, voilà la physionomie de cette période d'été 1973. Sur le plan culturel, il semble que le déroulement des programmes ait plu si l'on en croit les très nombreux amis qui nous ont fait part, oralement ou par lettre, de leur satisfaction. Le nombre d'examens passés avec succès et parfois brillamment est très satisfaisant. Nous avons donc tout lieu de nous réjouir ? Non, car un rapide coup d'œil sur les résultats financiers montre que ceux-ci sont moins satisfaisants que l'an passé. L'an dernier, la Maison avait profité du fait que le congrès d'U.E.A. avait lieu en Amérique du Nord et de nombreux espérantistes européens n'avaient pas pu se rendre à Portland. Cette année, nous revenons au niveau de 1971. D'autre part, l'augmentation des salaires et des denrées alimentaires est très forte. Il ne nous sera pas possible d'investir autant que nous aurions aimé le faire. Nous nous efforcerons cependant de faire ce qui nous paraît essentiel : circuit électrique d'alimentation du 2e étage, sanitaires pour les campeurs, début d'aménagement de chambres dans les communs. Pourrons-nous réaliser tout cela ? Les devis des entrepreneurs apporteront la réponse.

Et la salle de conférences ? Elle est évidemment restée dans l'état où elle était en juillet. Mais les travaux vont reprendre : ouvertures, électricité, cabine de projection. Le mode de chauffage est à l'étude. De gros frais en perspective. Mais nous comptons sur les inlassables efforts de l'Association Culturelle et sur la générosité de nos amis pour que les travaux soient conduits à bonne fin.

Ce que les stagiaires aiment à Grésillon c'est non seulement le cadre, les activités, mais encore l'atmosphère, cette atmosphère qui dès le départ a été voulue familiale. La vie collective même en famille impose quelque discipline basée sur le respect des autres et du bien commun. A Grésillon, entre espérantistes, chacun respecte chacun ; mais peut-être pas toujours le bien commun autant qu'il respecte sa propre maison. Grésillon n'est pas une entreprise privée. L'objet que l'on emporte par mégarde, la couverture neuve que l'on abîme en l'étendant sur l'herbe, la tapisserie que l'on souille en collant un « poster » ou qu'un enfant mal surveillé déchire, ce n'est pas le patron de l'entreprise qui devra réduire son bénéfice pour le remplacer ou le réparer. C'est la collectivité car les investissements, c'est-à-dire la modernisation, les nouvelles installations, devront être réduits d'autant. Les couverts que l'on transporte d'une table à l'autre, c'est une complication pour le personnel qui doit modifier les plats préparés selon un certain nombre de convives par table, une cause d'énervement, un retard dans le service. La clé de douches que l'on oublie de rapporter c'est peut-être plusieurs amis auxquels vous interdirez de faire ce que vous même avez eu la possibilité de faire ; L'objet que l'on emprunte sans rien dire et que l'on conserve dans sa chambre, car c'est bien pratique de l'avoir sous la main, et que l'on retrouve après le départ, c'est du temps perdu pour celui ou celle qui l'a cherché. Les verres et les bouteilles que l'on trouve dans une chambre à la fin d'un stage et qu'il faut redescendre c'est un effort supplémentaire demandé à un personnel peu nombreux, alors que sans aucune peine on aurait pu apporter ce matériel au fur et à mesure.

Le président est bien moralisateur tout à coup ! Non, il a simplement le désir que se perpétue cette atmosphère que tous apprécient, qui fait l'originalité de Grésillon. Pour cela, il suffit que, dans la collectivité familiale dont personne ne peut être exclu, ni les responsables, ni le personnel de service, chacun ait conscience de l'autre, de son travail, de ses besoins et de ses plaisirs.

P. BABIN.

NOS JOIES

Nous sommes heureux de faire savoir à tous, comme ils nous l'ont fait savoir à nous même, que nos amis Leriche ont mené à bien la culture de leur jardin, et qu'est né un petit Yann. Félicitations aux parents et bienvenue à Yann.

NOS PEINES

Mme Cheverry, vice-présidente de notre Maison Culturelle, a eu la douleur de perdre son père. Nous tenons à lui présenter nos bien vives condoléances.

***

Nous avons appris avec stupeur le décès de Jacqueline Guyon, jeune espérantiste et déjà fidèle à Grésillon. Que ses parents trouvent ici l'expression de notre profonde sympathie.

PHILATELISTES

Timbres neufs de Bulgarie et de Roumanie à 50 % du prix du catalogue. Envoyez 10,00, 20,00, 30,00 francs à P. Babin, C.C.P. Nantes 2 813 61.

Il nous reste quelques séries de diapositives sur Moscou et ses musées. 20,00 francs la série de 20 diapositives.

ASSOCIATION CULTURELLE DES AMIS DE GRESILLON

(C.C.P. Nantes 2 512 17 - Adhésion simple : 5 F.)

LISTE DES DONATEURS (troisième liste)

Pialla Augustin (Nyons)	50,00
Bauzil Jean (Toulouse)	50,00
Centre Culturel (Grenoble)	50,00
Doriat Edouard (Amiens)	50,00
Mauchien Renée (Amiens)	50,00
Charlet Fernand (Amiens)	50,00
Centre Culturel (Valence)	30,00
Eisembahn Spar (Frankfurt)	27,86
Fort Pierre (Fontaine-les-Grés)	25,00
Balmes Ginette (Le Martinet)	25,00
Houlgatte Andrée (Paris)	25,00
Broise Auguste (Nonancourt)	20,00
Edard Olivier (Cavignac)	25,00
Villanova Julia (Marseille)	25,00
Clavier (Caluire)	25,00
Despiney Jeanne et Jean-François (Le Perreux)	25,00
Blaye Léo (Muret)	20,00
Amouroux Jean (Perpignan)	20,00
Dr Basman Michel (Le Boulou)	20,00
Thévenet Esther (Lyon)	15,00
Lefèbvre Maurice (Le Mans)	10,00
Lamarca Raymonde (Chili-Mazarin)	10,00
Frangeul André (Angers)	10,00
Lucas Paulette (Pamiers)	5,00
Robert Michel (Marseille)	5,00
Robert Clément (Bourges)	5,00
Le Romancer Roger (Saint-Nazaire)	5,00
Cortes Henriette (Nantes)	5,00
Mourgues Auguste (Montpellier)	5,00
Couzin Jean-Pierre (Rueil-Malmaison)	5,00
Ozil Louis (Uzes)	5,00
Ribot André (Marmande)	50,00
Leclercq Cl. (Amiens)	50,00
Benazet René (Perpignan)	100,00
Villette Léonie (Ponts-de-Cé)	25,00
Bracquemond Guy (Clermont-Ferrand)	100,00
Beau Jean (Velaux)	50,00
Marin Jean-Jacques (Bagnolet)	100,00
Gaume F. (Lyon)	200,00
Lavallée (Le Havre - Bléville)	100,00
Billiemaz P. (Lyon)	50,00
Chasseriaud Louis (Royan)	100,00
Schertzer (Lons-le-Saulnier)	5,00
Blanc (Nevers)	5,00
Regard (Orléans)	10,00
Prigent (Puisseaux)	5,00
Goudé (Vieil-Baugé)	10,00
Minault (Niort)	5,00
Leriche (Perros-Guirrec)	18,00
Benaim (Agen)	10,00
Matzinger (Obernai)	5,00
Valtas (Argentueil)	10,00
Radley (Wanstead)	40,00
Ravillon (Tours)	10,00
Aude André (Chambray-lès-Tours)	20,00
Ducrocq Julien (Calais)	50,00
Etienne Pierre (Malzeville)	50,00
Mongilardi Renée (St-Joseph-de-Rivières)	10,00
Dorner Hans (Alberichstvb)	15,90
Gonin R. (Villeurbanne)	50,00
Batailler Gabriel (Eguilles)	20,00
Gonin Jacqueline (Villeurbanne)	50,00
Benistant Justin (Le Mans)	100,00
Trésorier Jacqueline (Pougues-les-Eaux)	100,00
Montagne Paulette (Evreux)	100,00
Moutounet (République Malgache)	50,00
Jelenc Féodor (Châtellerault)	120,00
Louys (Besançon)	10,00
Le Magadure (Hennebont)	5,00
Martin Robert (Rennes)	20,00
Caille E. (Saint-Etienne)	25,00
Total	**2.551,76**

LA REVUE (abonnements Bienfaiteurs)

M. Clechet (06)	30,00	S-ro Polhaus (All. Féd.)	15,00	P. Robiolle (92)	15,00
G. Dairon (86)	15,00	S-ro Wielgus (All. Féd.)	40,00	A. Labatte (80)	15,00
S. Cnudde (59)	15,00	S-ino Micard (53)	30,00	R. Lenel (22)	15,00
R. Gimel (03)	15,00	M. Hervouet (92)	15,00	M. Mouveaux (59)	15,00
R. Kubler (68)	15,00	G. Rabin (49)	15,00	S-ro Eizo Seita (Japon)	15,00
M.-L. Romagny (69)	20,00	M. Drillien (71)	15,00	A. Ribot (47)	20,00
A. Bourdet (64)	15,00	M. Gaudry (92)	15,00	J. Wynholds (U.S.A.)	20,00
G. Treanton (22)	20,00	A. Delisle (75)	15,00	H. Benaim (47)	15,00
J. Guillaume (78)	15,00	P. Petit (93)	15,00	F. Chamarier (69)	15,00
J.-P. Guillot (86)	15,00	R. Raynaud (30)	15,00	M. Igigabel (53)	15,00
P. Chevalier (44)	15,00	M. Bossard (44)	15,00	A. Pichon (72)	15,00
J. Weidacher (All. Féd.)	15,00	P. Bourquin (25)	15,00		
G. Dairon (86)	15,00	R. Benazet (66)	15,00	Total	**705,00**
F. Le Magadure (56)	15,00	J.-P. Guillot (86)	60,00		

Attention ! à partir de l'année 1974 les tarifs de l'abonnement à « Kulturaj Kajeroj » sont portés à 20 F. pour l'abonnement bienfaiteur et à 15 F. pour l'abonnement simple. Nous nous excusons auprès de nos fidèles lecteurs de cette augmentation, mais l'évolution de nos frais nous y oblige.

CONSEIL D'ADMINISTRATION DU 1er JUILLET 1973

La séance est ouverte à 10 heures, sous la présidence de M. Babin. Sont présents : Mmes et MM. Babin, Boyet, Ciret, Bénistant, Métivier, Jelenc, Dairon. Se sont fait excuser : Mlles Vazon, Mmes et MM. Cheverry, Micard, Guillot, Benazet, Bodereau.

STAGES DE PAQUES 1973 :

Dans l'ensemble, la participation a été peu importante, en raison du décalage des dates de vacances scolaires des différents secteurs.

Premier stage (pour les jeunes d'U.F.E.). — Il semble que la propagande pour cette période ait été insuffisante et tardive, et la préparation assez mal organisée. La discussion sur le thème « Kunvivado » aurait pu être beaucoup plus fructueuse si le public avait été plus diversifié. En effet, il n'y avait que 10 jeunes sur 40 participants.

Deuxième stage. — Là aussi il y a eu peu de participants et très peu d'étrangers. Cependant, M. Ribot a assuré les activités culturelles avec le succès habituel.

Il y a eu quelques petits problèmes avec le personnel de cuisine.

Depuis, divers passages ont été assurés sans problèmes particuliers d'administration : Week-end Delaire, Universités Populaires, Ecole du Vigeant en visite au Lude.

STAGES D'ETE 1973 :

Première période. — Participation importante avec un maximum prévu de 120 personnes. Trois cours habituels dirigés par Dominique Babin, M. Le Magadure, M. Babin. Certains participants pourront passer le « Pedagogia Atesto », comme ils l'ont demandé.

Activités annexes : vannerie, reliure, émaux.

M. Le Magadure assurera également un stage Freinet pour enseignants. L'administration sera assurée par M. et Mme Babin.

Deuxième période. — Deux semaines internationales. Participation étrangère assez importante bien que les inscriptions soient toujours assez tardives. Le catalogue des conférences est bien garni. Activité annexe : vannerie. Administration : M. et Mme Guillot.

Troisième période. — Elle s'annonce assez maigre. Il n'y a que 40 inscriptions définitives, mais encore de nombreuses demandes de renseignement.

Trois cours : 1er degré, dirigé par Evelyne Le Magadure ; 2e degré, dirigé par Ludoviko Valles ; 3e degré, dirigé par M. Ribot.

Administration assurée par M. et Mme Bodereau pour deux semaines, M. et Mme Ciret pendant la troisième semaine.

Activités annexes : vannerie, reliure.

En ce qui concerne la cuisine, Mme Barillet assurera le service pendant le mois de juillet, M. Garraud pendant le mois d'août.

PROJETS POUR L'ANNEE PROCHAINE :

Afin de rendre plus attractifs les stages de Pâques et la participation plus importante, il est envisagé un stage Freinet guidé par M. Le Magadure, ainsi qu'un cours pour enseignants désirant passer le « Pedagogia Atesto », organisé par I.E.F.

TRAVAUX :

Poursuivant les aménagements des locaux afin de satisfaire les demandes plus fréquentes de chambres particulières, la M.C.E. a transformé certains dortoirs.

M. et Mme Ciret, après le gros œuvre, ont réalisé un énorme travail de finition (peinture et tapisserie). Déjà 3 millions anciens ont été dépensés à ces travaux. Des w.-c. supplémentaires ont été installés au deuxième étage, ainsi qu'une pièce pour stocker les archives.

La prochaine tranche de travaux verra la réfection du couloir du deuxième étage et l'amélioration du circuit électrique.

Au premier étage, un deuxième w.-c. a été installé et un emplacement pour deux douches.

Dans la cuisine, il a fallu installer une poutrelle métallique pour consolider le plafond.

Toutes les chambres refaites sont alimentées en eau chaude, et le coin toilette est isolé par une cloison.

Des plantations sont décidées à la limite de la propriété, le long de l'étang creusé récemment sur un terrain voisin.

QUESTIONS DIVERSES :

M. Babin présente un modèle de calendrier perpétuel en espéranto, qui sera vendu au château. Le Conseil d'administration donne son accord et décide également de verser à M. et Mme Ciret une indemnité dont le montant sera fixé en accord entre les intéressés et le président.

Le gros œuvre concernant la transformation du garage en salle de réunion a été réalisé. Déjà, ce local pourra être utilisé pendant l'été pour certaines activités.

L'ordre du jour étant épuisé, la séance est levée à 12 h. 30.

Le secrétaire de séance,
G. DAIRON.

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ

de P. Babin

Prix : 8,50 F.

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET
route de la Boulerie
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 10 Fr.

Demandez notre catalogue

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon : noires :	0,50 F.
couleur :	0,60 F.
Cuillères de collection : 9,00 et	12,00 F.
Pendentifs :	7,00 F.
Disques de stationnement :	3,00 F.
Etoiles pour vitres de voitures :	1,00 F.

et :

Les Héros Existentialistes

(texte français-esperanto)

de Colette Llech-Walter : 3,00 F.

(plus frais d'envoi pour commande au-dessous de 10,00 F.).